

Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ

<http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k61.htm>

<http://www.iespana.es/esperanto/k61.htm>



Striko de aĉetantoj!

**Kontraŭ infanlaboro kaj plialtiĝo
de la vivokosto!**

Majo 2-an

Kajeroj

el la Sudo



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

Prezidanto: **Juan Antonio Cabezos Martínez**,
c/ Jabonerías, 6-3ºD,
ES30 001 Murcia (Hispanio)

Vicprezidanto: **Pedro Ruiz García**,
c/ Almenara, 17-2º B,
ES30 004 Murcia (Hispanio)

Sekretario: **José Pina Tuells**,
Av. Murcia, 7-3º A
30110 Cabezo de Torres (Murcia)

Kasisto: **Carmen Hernández Valdés**,
Avdº Marín Esparta, 15-3ºA
30008 Murcia.

Redaktoro: **Jesuo de las Heras**,
Apartado 4461
ES30080 MURCIA

Kajeroj el la Sudo regule interŝanĝas kun:

- 1 **Esperanto**, redaktata de Stano Marček,
 - 2 **Boletín**, de Miguel Gutiérrez Adúriz,
 - 3 **Monato**, de Stefan Maul,
 - 4 **Juna Amiko**, de Geza Kuruez,
 - 5 **Sennaciulo**, de Krešimir Barkovič,
 - 6 **SAT-Amikaro**, de Jean Selle,
 - 7 **Internaciisto**, de Luis Serrano.
 - 8 **La Kancerkliniko**, de Ĵak le Puil,
 - 9 **Litova Stelo**, de Petras Čielauskas,
 - 10 **Liberecana Ligilo**, de Ĵakvo Schram,
 - 11 **Laŭte!**, de C. Baudé,
 - 12 **La Migranto**, de Antje Noordewier,
 - 13 **Juna Penso**, de Vinko Markov,
 - 14 **SLEA-Infomilo**, de P. Persson,
 - 15 **Naturista vivo**, de Ervin Fenyvesi
 - 16 **La verda proleto**, de komitato.
- Al ĉiuj, dankon pro via subteno kaj lernigo.

Pretigas la Kajeron:
Provkorekto: **José Pina Tuells**,
Redakto: **Jesús de las Heras**

*Monsendo de kotizoj kaj abonoj al konto n°
2100-4455-71-0200055454. Sen aldona kosto.
La abono kostas 5 eŭrojn. Kvitancon oni ricevos.*



Kovrilo: Malplena aĉetĉaro simbolas strikon de aĉetantoj
kontraŭ infanlaboro kaj plialtiĝo de la vivnivelo.

Enhavo

Redaktore	3
Informoj de la prezidanto	4
La 4-a Kongreso de HALE	4
Pri la vizito de John Wells al Tenerifo	5
Liberpenso	9
Kelkaj konkludoj pri la Virtuala Kongreso de Esperanto	10
La Tago de Zamenhof	12
Renovigo de la agado de HALE	14
Kio estas progreso?	16
La Faraono	18
Enkonduko en muzikon: Georgo Brasan'	23

Ne subskribitajn
artikolojn verkis
la redaktoro.

Oni povas reprodukti
artikolojn, kondiĉe ke
oni citu la originon.

*Ni ne korespondos pri nepetitaj
artikoloj. Tamen, ni klopodos publikigi
ĉiun artikolon kies enhavo estas inte-
resa kaj ne mistraktas iun ajn per-
sonon.*

*Pri la enhavo de la
artikoloj respondecas
la aŭtoroj mem, ne la
redakcio.*

Redaktore

Mi ĵus ricevis leteron el Ĉeĥio, dirante, ke *Mi deziras sciigi vin, ke mi ne reabonos **Kajerojn el la Sudo** por la jaro 2004, ĉar mi tute ne komprenas*



kial en laborista gazeto aperis artikolo laŭdante Frankon, danke al kiu Hispanio ĝuis 36 jarojn de diktatoreco.

Nu, kelkajn erarojn faris tiu samideano, probable sen averti ilin. Dekomence, Hispanio ne ĝuis diktatorecon, sed suferis ĝin. Ĉu Franko sola, ĉu ankaŭ aliaj homoj kaŭzis la militon kaj sekvan diktatorecon, estas ankoraŭ diskutata. Ĉu demokratieco estas inda regomaniero, ankaŭ estas diskutata, en lando, kie civitanaro ne zorgas pri politiko, sed pri *Granda Frato*, kaj kie la amas-komunikiloj estas en manoj de riĉuloj, kaj kie demokratio mem estas forrabita de politikaj partioj kaj sindikatoj, lasante al komuna civitano sole la eblecon elekti kiun hundokolĉenon la popolo montros dum la venonta kvarjara periodo.

Mi ricevas tiun leteron el lando, kie ekzistis diktatorecon, eble pli fia ol tiu de Generalo Franko, ĉar ĝi estis en la landaro de la Traktato de Varsovio, tio estas, komunisma lando, kie libereco tute ne ekzistis. Ne miru, ke en Ĉeĥio demokratio ekvalas liberecon, kaj diktatoreco ekvalas komunismon. Sekve, tiu kamarado ne komprenos, ke Generalo Franko kaj siaj soldatoj estis la sola forto, kiu malebligis, ke Hispanio iĝis landon tian, same kia Ĉeĥio estis, kie la Komunisma Partio anstataŭis la volon de la popolo. Do, ne libereco ekzistis en Hispanio, kvankam komunismo ankaŭ ne ekzistis. Mi ne

scias, ĉu tio estas facile komprenebla al homo, kiu estis katenita al komunismo kontraŭvole.

Sed tion diras historio, kaj oni povas kontroli per la koncernaj ĵurnaloj de landoj tiom malsuspekteblaj pri diktatoreco kiel Francio aŭ Britio, eĉ Usono. Mi ne laŭdis Generalon Frankon, kaj ankaŭ ne laŭdis lin Pío Moa en sia libro **La mitoj pri la Intercivitana Milito**. Nun oni povas atingi dokumentojn, kiuj antaŭe estis sekretaj, kaj oni povas kontroli aferojn, kiuj okazis en nia lando antaŭ 70 jaroj pli objektivite ol antaŭe. Mi rekomendas legi la libron antaŭ decidi opinion maljustan.

Se leganto de **Kajeroj el la Sudo** deziras doni diversan opinion pri Generalo Franko aŭ iu ajn homo historia aŭ afero, li aŭ ŝi nur bezonas sendi la artikolon al mi. Fordisŝiri sian veston ne helpas klarigi la aferojn, kaj certe ne al Esperanto helpas dizerti.

Por *nedizertuloj*, mi diros, ke mi pardonpetas pro la nova prokrasto je la apero de nia magazino. Tio estas ĉefe pro mia okupo pri la *Gazetoteko Lanti*, pri kiu vi legos poste, kaj kiu postulas tiom da tempo mia. Estas vere, ke kelkaj esperantistoj helpis min per sia havigo al mi de malnovaj magazinoj, kaj mi vere dankas ilin pri tio, sed mi estas sola kompili la koncernajn dokumentojn de nia virtuala gazetoteko. Estas multe da homoj dise en la mondo, kiuj ja povas helpi min en la laboro, kaj kelkaj el ili jam ofertis sian helpon, sed tiu oferto ne venas..., ankoraŭ, ni esperu.

Denove ni havas novan ĉapitron de **La Faraono**, kaj novan ĉapitron pri muziko, ĉifoje pri neforgesebla franca muzikisto Georgo Brasan' (Georges Brassens), duonateisto, duonanarĥiisto, duonsennaciulo.

Sed plej novaĵo estas, ke ni finfine havis Virtualan Kongreson, la 3-an kongreson de HALE. Dum 20 tagoj ni *virtuale* kongresumis. Je paĝoj 9, 10, 14, kaj 16 ni lernas pri tiu grava evento. Mankas prelego de S-ro Pina Tuells, kiun oni legos en numero 62-a de **Kajeroj el la Sudo**.

Informoj de la prezidanto

Estimataj haleanoj: Post la sukceso de nia Virtuala Kongreso, novan aferon ni pritraktas.

Kiam dum la kongreso nova samideano



proponis fari strikon de aĉetantoj, unue mi surpriziĝis, ĉar HALE en sia historio, neniam faris strikon, kaj poste mi pensis *Kial ne?* Ĉar HALE estas asocio kiu estas la unua,

kiu malaltigis sian kotizon, la unua fari virtualan kongreson..., kaj kial ne esti la unua fari strikon per interreto?

Kiam la estraro studis la aferon, ankaŭ unue ĝi surpriziĝis kaj poste pensis same kiel mi.

La strikon estu de aĉetantoj esperantistoj kaj en esperantistaj medioj, unue.

La dato estas la 2-a de majo. Kial? Estas simpla kialo: la unua de majo estas la Festo de la Laboristoj, ĝi estis la celo de la Unua Internacio. La estraro proponas la 2-an de majo kiel dato por ke laboristoj faru **strikon Kontraŭ la laboro de la infanoj** kaj kontraŭ la kosto de la viando, la domoj, ktp, tio estas, **Kontraŭ la plialtiĝo de la vivnivelo**.

La unua paĝo de la bulteno *Kajeroj el la Sudo* estas tre klara: aperas aĉet-ĉaro malplena.

Ni kontrolas la aktivadon de la striko per du kontroloj: unu de la samideanoj kiuj jam diras, ke ili strikos kaj de la asocioj, esperantistaj aŭ ne, kaj la dua de la samideanoj, kiuj, je la tago de la striko, faros la strikon.

*Johano Antonio
Cabezas Martínez*

**La 4^a Kongreso de HALE estos
Kongreso Virtuala
De la 1-a ĝis la 15-a de
decembro vi partoprenu la 4-an
kongreson de HALE de ĉiu ajn
loko de la mondo!
Aliĝu (**senpage**) kaj informiĝu je
la adreso <http://www.gazetoteko.com/kn/>
de nun.**

PRI LA VIZITO DE JOHN WELLS AL TENERIFO (KANARIOJ)

Pasas jam antaŭ ni dekjarigo de la forpaso de nia kara majstro Pr-o Juan Régulo Pérez. Por lin omaĝi postume, nia

samideano Pr-o Leandro Trujillo Casañas, Direktoro de la *Real Sociedad Económica de Amigos del País* de Tenerife, proponis al ni sian ideon inviti al elstara esperantisto Pr-o Ĝon C. Ŭelz, katedra profesoro pri fonetiko, tre bone konata en la universitataj medioj pri literaturo kaj angla filologio, por prelegi en La Laguna.

Al nia nuna prezidanto, la eldonisto S-ro Antonio Suárez, tiu ideo ŝajnis tre grava, kaj tikla ĉar eble ni bezonus konsiderindan sumon da mono por tion realigi. Do, la solvo povus esti en la impliko, ekzemple, de la Universitato de La Laguna, ĉar tie instruas la Pr-o pri Angla lingvo, S-ro Alejandro F. López de Vergara eĉ eble, al universitata estraro, ĉefe tiu fako pri angla filologio, al kiu povus interesi partopreni en tiu ĉi projekto, kondiĉe ke S-ro Wells prelegu angle pri filologiaj temoj.

Tiu ĉi teamo de “Musketistoj” rapide reagis kaj entuziasmigis al universitatestraro, ĉefe tiu de la Angla Filologio. La teamo interkonsentis kaj jen kiel la Pr-o John C. Wells serĉis en sia tempo taŭgajn datojn por alveni Tenerifen.

La unua tago de tiu pasinta Novembro, vespere, rekte el Londono venis S-ro Wells. Li estis flughavene akceptata de

tiu teamo, kiu lin kondukis per privata aŭtomobilo ĝis la centra hotelo “Nivaria” (Neĝita insulo) en La Laguna, post lin vidigi kelkajn interesajn pri tiu historia urbo, kiu estas Homa Propraĵo.



Unua Prelego.

La duan de novembro, dimanĉo, je la 11-a matene li prelegis en la ejo de ESTO, en la historia salono ĝentile pruntedonita de la RSEAPT* por tiu ĉi evento.

Solene akceptis lin, nome de la Esperantista Societo, nia Prezidanto, S-ro Suárez, kaj ankaŭ lian esperantan bonvenon faris Pr-o Trujillo per, pli malpli, jenaj vortoj:

Karaj geamikoj, miajn salutojn por vi ĉiuj!

Unue mi bonvenigas Prof. John Wells kaj dankas lian ĝentilecon esti hodiaŭ kun ni ĉi tie, sidejo de la Real Soceidad Económica de Amigos del País, omaĝe al Profesoro Johano Régulo Pérez en la deka datreveno de lia forpaso, kiu okazis la 27-an de Januaro de 1993.*

Samtempe mi deziras valorigi la fakton, ke du asocioj kiel estas la Esperantista Societo

*Reĝa Socio Ekonomia de Amikoj de la Lando.



de Tenerife (ESTO) kaj la Real Sociedad de Amigos del País de Tenerife, asocioj tre amataj de Juan Régulo, konsentus organizi ĉi tiun kunvenon. Profesoro Régulo aktive kaj tutkore deĵoris en ambaŭ asocioj dum multaj jaroj.

Pere de simpla sed sincera kaj amika kunveno, kiel estas tiu ĉi, ni deziras palpi la realan ĉeeston de Juan Régulo inter ni, ĉar lia fizica malapero neniam estis definitiva, kontraŭe, li pluviwas, kiel estis lia deziro: en lia verko, en la libroj kaj, kiu estas pli grava, en niaj mensoj kaj koroj.

Necese estas ke en la erao de la **komuna vilaĝo** kaj de la tutmondiĝo; kiam oni forgesas facile la homajn valorojn, estas necese ni diras, ke la altaj kaj humanistaj idealoj de Régulo persistas kaj flifortiĝos pere de nia laboro kaj atesto.

Fine, ĉar ni devas doni la vicon al nia invitito, mi dezirus, kun lia bonvolo, legi vin frazon de Régulo, kiu kortuŝis min antaŭ proksime dudek jarojn; kaj diras tiel: "...mi pligrandiĝos en la estonteco kaj renoviĝos en la gloro dume la enloĝantoj de La Lguna daŭrige trapasos la placon de mia nomo kaj

dum la homoj kleramantaj vizitos la bibliotekon kaj trafoliumos la libron de mia omaĝo...

Tiu aspiro de Juan Régulo, evidente, jam estas plenumita. Dankon!

Al tiuj vortoj invitito kaj ĉeestantaro forte aplaŭdis.

Poste prenis la vorton nia prelegisto, S-ro John Wells, kiu per perfekta kaj klara Esperanto parolis al ni pri sia ekkono de S-ro Régulo, en Barlaston, Britujo, okaze de iuj Esperanto-kursoj al kiuj S-ro Régulo estis invitita. Mallongigite, tiu karesa kaj elkora prelego resumas tiamaniere:

En la 60-aj jaroj okazis ĉiujare tutsemajna kurso de Esperanto en Barlaston, apud Stoneon-Trent, Britujo, sub la gvidado de Marjorie Boulton. Unu jaron ŝi invitis Prof. Juan Régulo Pérez kiel vizitantan instruiston. Tiel profesoron Régulo kaj mi konatiĝis. Frapis min unuflanke lia profunda scio de la literaturo de Esperanto, sed aliflanke lia forte hispaneca prononco.

Post tiam ni ofte renkontiĝis en kongresoj. En la jaro 1974 li eĉ vizitis mian hejmon en

Londono. La graveco de Juan Régulo por la historio de Esperanto estas antaŭ ĉio lia eldona agado. Per la eldonejo Stafeto, kiun li fondis, li alportis al la Esperanto publiko ŝlosilajn autorajn kaj verkojn -Auld, Boulton, Waringien, kaj multajn alijan. Dum la 26 jaroj de lia gvidado de Stafeto aperis ĉ. 90 titoloj. Brave li helpis pluporti la torĉon.

Al tiu prelego alvenis ne nur multaj samideanoj de ESTO, ankaŭ kortuŝe partoprenis la filinoj de S-ro Régulo, kiuj interparolis kun S-ro Wells en tre agrabla etoso. Certe Juan Régulo pluvivas inter ni.

Poste ni ĉiuj (ESTanoj kun S-ro Wells) meztagomanĝis kune en la “Casino de La Laguna” belega neoklasika konstruaĵo. Tie Wells ekkonis la kanarian manĝaĵon “Gofjo” (gofio) kun kanaria kocido.

Dua prelego.

La 3-an de Novembro ni profitis okazon por montri al S-ro Wells la “nekonatan insulon”, montrante al li pejzaĵojn kaj insulon tute malsamajn al tiuj konataj de la turistoj. Li vizitis le oldan kernon de La Laguna, kiu estas Homa Propraĵo, kaj poste, per malnovaj sed belegaj antikvaj vojoj, vizitis Takoronten kaj Saŭzalón. En tiu lasta belega urbeto li povis miri

(timege) la altegajn klifojn nomitaj “La Garañona” (sovaĝa ĉevalino), pli ol 300 metrojn alten en vertikala falo ĝis la maron. Poste ni prenis alian malnovan vojon por al li montri la “Etan kanjonon de La Kolorado” kiu situas en Tacoronte, kaj la bela marbordo “Mesa del Mar”, plata duoninsuleto apuda al fiŝkaptista kvartalo “El Prix”.

La veturado daŭrigis per vizito al la “Pinto de la Malriĉa Nobelido” (Punta del Hidalgo Po-bre) kies akre sovaĝaj marbordaj pejzaĵoj estas unikaj.

Tion farite, ni vizitis la montaron de “Las Mercedes”, verda kaj freŝa monto kiu ne bruliĝas eĉ ankaŭ dum la plej varmaj someroj. Tie ni bongustumis meztagomanĝon, per “papas arrugadas” (ĉifitaj terpomoj), seka moruo -gado-laŭ la kanaria stilo, aranĝitaj kikeroj, fromaĝo, ktp. (Tiu “ktp” estis ankaŭ bongusta).

Post tiu meztagomanĝo ni vizitis la Ĉefurbon, Santa Cruz de Tenerife, sed nek per la aŭtovojo, nek per malnova vojo Santa Cruz-Laguna, sed tra la montaroj kaj kvartalo de “Los Campitos” (La Kampetoj) rigardante, en unu nura vidado, la tutajn urbojn Santa Cruz kaj La Laguna, same ol ĝi estus viditaj aviadile. Kaj same ni vizitis la



Plaĝon de “Las Teresitas” (terezetoj) kies vidindejo super ĝi, estas mirinda.

Vespere li pretigis la duan prelegon, kiu okazos en Esperanto kun samtempa tradukado al lingvo Hispana, la venonta tago, en la RSEAPT por esperantistoj, RSEAPT-anoj kaj ĝenerala publiko.

La kvara de novembro, vespere, alvenis raportistino de “Radio Isla”, S-ino Maria Perdomo kiu gvidas radiospacon “Enciklopedio de la Vivo”. Ŝi intervjuis al S-ro Leandro Trujillo kaj poste kaj detale, S-ron Wells. Tiu intervjuo estis elsendita radie la 7-an de Novembro, de la 5-a ĝis la 6-a vespere.

Je la 7^a vespere oni malfermis specialan libromontron dediĉitan al Prof. Juan Régulo, en kiu aperis multaj el liaj eldonaĵoj, fotoj ktp. Kaj je la oka komencis sian prelegon S-ro John Wells, kies titolo estis “De Askio al Unikodo: la internaciigo de la Interreto (Del ASCII al UNICODE: La internacianalizaci3n de Internet)” La prelego estis majstre samtempe tradukata al hispana lingvo per nia Prezidanto, S-ro Su3rez. Kaj ni diras “majstre” pro tio ke li ne nur estas elstarega esperantisto, eĉ ankaŭ grava eldonisto kiu regas komputadon.

La prelego estis sukcesa kaj ĉiuj ĉeestantoj lernis multe pri la uzado de UNIKODO por atingi en niaj komputilo, je la plej facila maniero, niajn “ĉapeletojn”. La kompletan tekston vi povas trovi en Interreto, vizitante la pagon de la S-ro Wells:

[http://www.phon.ucl.ac.uk/home/wells/retarevo lucio.htm](http://www.phon.ucl.ac.uk/home/wells/retarevo%20lucio.htm)

Poste de tiuj du, por ni gravegaj, prelegoj li vizitis la ceterajn partojn de nia insulo kaj prelegis dufoje en la Universitato de La Laguna, pri fonetikaj aspektoj de la angla lingvo. Tie li prelegis angle (kompreneble) ĉar li estis en la Filologia Fakultato pri Angla Lingvo, kaj Angla lingvo estas lia denaska idiomo.

La vendredon 7-an, dum la radiostacio “Radio Isla” elsendis kompletan informon pri tiu ĉi vizito, la S-ro Wells estis akompanata de Profesoro Alejandro F. L3pez de Vergara, kiu lin alportis al la flughaveno suda “Reĝino Sofia” (Reina Sofia) por reiri Britujon.

La Laguna, 7-an de Novembro de 2003.

Omarajan



Liberpensio: kiaj estu Kajeroj el la Sudo

Legado diras al ni, ke ekzistas libereco. Skribado permesas al ni pensi pli libere. Sed komenci skribi estas kvazaŭ ni malfermas skatolon, kaj ni ne scias pri tio, kion ni trovos en ĝi.



Tiu skatolo estas pensoj niaj, fontante el nia cerbo, nia kulturo, niaj antaŭjuĝoj, niaj mankoj, manioj niaj...

Pro tio, ni devas kontraŭstari niajn pensojn kun tiuj de najbaroj niaj, amikoj niaj, eĉ rivaloj niaj. Ni, kompreneble, ne povas postuli, ke ni estas en la vera vojo, kaj tiuj, kiuj deflankiĝas de ĝi, estas herezaj. Esti hereza postulas, ke estas dogmo. Dogmo, vera monstro, kiu jam mortigis tro multe da homoj, por ke ni honoru ĝin. Veraj dioj de mortigo kaj nekomprenemo, dioj de netoleremo kaj de memmortigo. Pro tio, ke ni ne scias pri tio, kion diable ni faras sur tiu ĉi atoma pulvero en la mezo de nigra spaco, aŭ pri nia vera origino, aŭ celo nia, ni ne povas malestimi ideon, senton, fremdan intereson. Ni aŭskultu aliajn homojn, kaj poste inter ni ĉiuj decidu, ĉu tio dirita konvenas al ni aŭ ne.

La homoj de pasintaj jarcentoj multe eraris, ĉar historio de homaro estas historio de milito. Homoj jam intencis plibonigi bonfarton de la plejmulto. Tamen, ili serĉis malamlikojn, kaj ili ja trovis ilin. Ili ne vidis, ke malamlikoj estas homoj samaj al ili, kaj ke ĉiam eblas interkonsento.

Pro tio, pro nia propra necerteco pri tio, kio estas plej konvena, pro tio, ke ni ne scias ĉion, pro tio, ke estas terura respondeco decidi nome de aliaj homoj, ni opinias, ke plej bone ni aŭskultu unue, kaj poste diskutu ni. Finfine estos interkonsento. Se ne estas interkonsento, ĉiu faru tion, kion li aŭ ŝi volu. Sed oni ne malestimu aliajn ideojn. Oni, sekve, ankaŭ, ne krimigu aŭ pezigu aliajn ideojn kontraŭajn al tiuj niaj. Se mi ne certas pri miaj konkludoj, kial mi devas fidi aŭ kredi al tiuj de alia homo? Li aŭ ŝi bonvole pruvu al mi, aŭ lasi min kun miaj propraj manioj! Ni, ververe, se estas inteligentaj ni, ne kredu, ke ekzistas tiu bela elpensajo, vero! Oni kontentiĝu kun bona percepto pri realo anstataŭe.

Pardonpetas mi pri tiu filozofieska enkonduko, tamen tre grava al mi. Kiam mi venis en la redakton de nia bulteno, *Kajeroj el la Sudo*, mi trovis la malagrablan realon, ke homoj deziris diri sian opinion je la paĝoj de nia magazino, sed tamen ili ne povis. Estis baroj. Estis malfaciloj. Tio ankaŭ okazas, bedaŭrinde, en aliaj magazinoj de la Esperanta Movado. Ne antaŭ multe da jaroj mi klopodis publikigi artikolon pri UEA, kaj pro tio, ke esperantaj redaktoroj ankaŭ timis veron same kiel —se eble ne pli ol—neesperantaj, mi devis vidi mian artikolon senpublikigita... sed finfine redaktoro publikigis ĝin. Tiuj redaktoroj, vere, estis senkuraĝuloj, kiuj timis —eble ankoraŭ timas— debaton. Mi konsideras, ke ili

ne estas pli bonaj —esence— ol inkviziciistoj. Varias la rimedoj, sed ne la celo kaj efiko: subpremi liberan opinion. Plej bone estas aŭskulti homon tute, scii pri tio, kion li aŭ ŝi havas en sia koro, kio pezigas kaj blindigas sian objektivan alrigardon al realo, kaj poste helpu lin aŭ ŝin per serioza —aŭ ne tro mokanta— diskutado, kaj finfine atingi kuraĝigan konkludon. Mi iam pensis, kio okazintus, se kiam Adolfo Hitlero publikigis *Mein Kampf* (mian lukton), se la ceteruloj, anstataŭ ignori ĝin aŭ kondamni ĝin, traiektintus la tutan libron kaj poste debatintus ĝin, eble li ne havintus sekvantojn. Mi legis ĝin iam, kaj mi serioze opinias, ke mankas esperanta versio pri ĝi. Oni legu pri la lupoj, kaj poste ni desegnu efikan kaptilon kontraŭlupan. Ĉu eble ne estintus la Dua Mondmilito? Ĉu ne du Germanioj, ne ekssovetaĵ landoj, ne Insularo Gulag, ne tiom da sufero senutila...? Aliflanke, kio okazintus, se kiam Marks kaj Engels publikigis sian *Manifeston de la Komunisma Partio*, anstataŭ persekuti, enkarcerigi kaj fifamigi komunistojn, oni sukcesintus kontraŭstari ilin pervorte —anstataŭ perforte—, ĉu Sovetunio iam ekzistintus?

La Inkvizicio ne aŭskultis siajn perzekutatojn, sed torturis kaj murdis ilin, same kiel hitleranoj, komunistoj kaj ĉiuj aliaj homoj, kiuj iam estis posedadoj de dogmaro. Homo, kiam ĉesas pensi, estas plej barbara hundo. Hundoj, oni diras, atente rigardas batalon hundan, kaj kiam unu el batalantoj falas, la aliaj manĝas la falinton. Jen leĝo de ĝangalo. Homo, kiam hundeska, estas vera mastro inter hundoj.

Sed homoj havu cerbon funkciantan, homoj uzu ĝin, kaj rezonu, pensadu, diskutadu, alproksimiĝu al aliaj homoj, kiuj pensas alimaniere. Ni venu en interkomunan vidpunkton.

Liberpensio, kompreneble, ne estas celo en si mem. Liberpensio ne estu dogmo. Liberpensio estu nur kadro, sojlo sub kiu okazu libera diskutado, fruktodona debatado. Jen la radiko de toleremo, kiu ŝuldas nenion al subpremado aŭ subpremado. Eble ne ni ĉiuj estas samaj. Eble ne ni ĉiuj emas labori tiom multe. Inter ni ja certe estas pli pigraj kaj pli laboremaj homoj. Sed ni ĉiuj havas percepton unikan de realo, de historio kaj de manioj kaj teroroj personaj. Ni akceptu alies vidpunktojn kaj helpu unu la aliajn.

En la lasta jaro estis malfacilaĵoj por HALE fontante el homoj, kiuj opinias, ke nur sia percepto de realo valoras. Mi vere kompatas ilin. Ili estas diktatoroj sen povo. Tio estas groteska. Ili ne estas por kunlaboro. Ili estas senhelpaj.

Mi eĉ ilin ofertas, de ĉi tiu loko, mia kunlaborado kaj mia komprenemo. Ne gravas, ke ili reprezentu la lastan militkriion de mortanta ideologio. Ili valoras multe pli ol ideologio ĉu sia, ĉu alia, eĉ ĉu mia, se min iam kaptos tiu monstro, ideologio..

Jesuo

Kelkaj konkludoj pri la Kongreso Virtuala de Esperanto

Dum la Centkvardekkvara Tago de Zamenhof, kelkaj gesamideanoj kunestis por nia jara manĝada omaĝo al Fondinto de Esperanto. Ni estis malmultaj, sed tamen ĉiu generacio estis tie reprezentata: la veteranoj, kiuj kutime ve-

de la Kongreso, kaj finfine oni decidis pludaŭrigi la Kongreson ĝis hodiaŭ, la 20-an de decembro.



nas infekti nin per sia entuziasmo, eĉ se ili ne ĉiam sukcesas kompreni tion, pri kio temas la diskuto; la pli junaj, homoj profesiaj kaj metiaj, kiuj nune prenas sur siajn ŝultrojn la torĉon de Esperanto; kaj ankaŭ infanoj, la esperantistoj de la estonto, tiuj, kiuj eble nun ne parolas Esperanton, sed kiu nepre faros tion en la futura mondo antaŭvidebla.

Tiun tagon devus esti la fino kaj fermo de nia Kongreso Virtuala de Esperanto, 1-a, sed tamen 3-a de HALE. Tiam ni informis pri la disvolvo

Ni havas hodiaŭ, la 20-an, kelkajn eltiraĵojn pri nia Kongreso, kiu helpas plibonigi ĝin la venontan fojon:

1. La partoprenado, eĉ se konsiderate nur el la vizito kaj legadoj de la prelegoj, estus tute sukcesa, konsiderante la kvanton de virtuala esperantistoj, kiuj ekzistas en la mondo, ne estas tre ĝojiga: nur 99 partoprenis. El tiuj, nur manpleno konsentis esti en nia **Kongresa Libro**. Ili estu veraj iniciatoroj en tiu iniciato, kaj historio parolos nepre pri ili. Aliaj

samideanoj, kiuj venis kaj legis tion, kion ni havis diri, opciomis ne diri ion ajn, ĉu pore, ĉu kontraŭe. Tio ja estas malgajiganta trajto. Ne havi opinion estas vera misfortuno, kaj fakte multe pli erara opcio ol simpla eraro.

2. Eble estas aliaj samideanoj, kiuj simple ne sciis pri tiu Kongreso. Esperantistoj kutime plendas, ke Kongresoj estas multekostaj, ke oni devas aldoni grandajn kostojn por la vojaĝo al foraj landoj, kaj ankaŭ pri tio, ke la organizado de la Kongreso difektigas. Tamen, nun estas kongreso, kiu kostas neniom, kies vojaĝo simple ne ekzistas, kongreso kiun oni povas partopreni de sia hejmo mem..., sed tio estas vane, ĉar eĉ tiel esperantisto simple ne partoprenas. Mia kalkulo, mi konfesas, ke tro optimisma, pri la kongrespartoprenantaro ĉirkaŭis kvin mil en du semajnoj. Nun fakte estas dudeko da tagoj, sed la cifero fiksiĝis ĉirkaŭ centoj. Se tiu estus normala kongreso de HALE, mi devas konfesi, ke cent vizitoj estus rekorda cifero. Sed pro la granda antaŭvidebla cifero, mi ne povas ne senti fraŭdita. Eble la Kongreso estis tro frua, la mondo esperanta ankoraŭ ne estas pretigita por Virtuala Kongreso, eble estas aliaj faktoj, kiujn mi pretervidis. Ni, la estraro de HALE, pripensos la aferon kaj sufiĉe frue avertos pri la venonta Kongreso Virtuala. Estas rimarkinde, ke la de ni promesitaj ekskursoj virtualaj ne aperis finfine, ĉar nur unu gvidanto ekskursis jesis al nia projekto, S-ro Lunazzi de Brazilio, kiu ĝentile ofertis preni nin al Igvasu kaj Itaipú vidi rimarkindan belajon kaj la plej grandan fabrikan da elektro en la mondo. Ni profitos lian helpon por la venonta kongreso.

3. Sed ni ne estu maloptimismaj, ni daŭrigu nian laboradon, kaj ni proponu denove, la venontan jaron, pli allogan Kongreson Virtualan de Esperanto. Multaj aferoj jam estos klarigitaj tiam, kaj mi esperas, ke homoj ne plu hontu veni al Kongreso. La paĝoj de la Kongreso Virtuala 1-a malaperos de

Interreto en la baldaŭa estonto, kaj mi anstataŭigos ilin per Kongresa Resumo, kiun mi publikigos en nia bulteno, **Kajeroj el la Sudo**.

4. Mi finos per vortoj pri niaj protektantoj: Kutime ĉiu kongreso havas honoran kongresanojn aŭ Altajn Protektantojn. Ankaŭ ĉi



tiu kongreso havis ilin: plej gravaj homoj, kiuj estis kune kun ni dum la tuta kongreso, kuraĝigante nin per sia arto kaj sia sono: ili briligis nian legadon, kaj ni samtempe omaĝis liajn bonarton: Nin protektis Johano Sebastianoj Baĥ, Ŝubert, Guno', Debisi', Albenis, Mosart, kaj Bokerini, eble plej vaste konitaj per siaj naciaj nomoj: Johan Sebastian Bach, Franz Schubert, Charles Gounod, Claude Debussy, Isaac Albéniz, Wolfgang Amadeus Mozart kaj Luigi Boccherini. Ili ĉiuj, malsame kiel la kutimaj pli-malpli altaj protektantoj de kongresoj esperantaj, ja protektis nian aferon. :-) Koran dankon al ili, kie ajn ili estas, se estas (certe en niaj koroj!) Kamaredece via,

Jesuo

Paĝo 11



María atente legas pri la Premio Zamenhof 2003.



Kiel tradicie, la geesperantistoj de la urbo Valencio festis la 144a datrevenon de la naskiĝo de D-ro Zamenhof, kreinto de nia lingvo Esperanto, en amikeca etoso, sabate la 20an de decembro. La ĉeestantoj havis la plezuron aŭskulti interesan prelegon, far S-ro Pascual Pont, sub la titolo: «La

fina venko». Post la prelego ekestis debato pri tiu temo, kaj poste ĉiuj rigardis video-filmon pri la koncerto de Georgo Handzlik en Kaliningrado. Fine ĉiuj iris al bela restoracio, por framdi tipajn valenciajn manĝojn.

Augusto

La tago de Zamenhof en Valencio, 2003

Renovigo de la agado de HALE kaj varbado de novaj membroj



Dekomenca situacio.— Ĝis nun la agado de HALE estas grandaprocente limigita al la paĝoj de sia presita organo, ***Kajeroj el la Sudo*** krom la laŭstatuta kaj sporada aranĝo de siaj kongresoj kaj estrarkunvenoj. Ankaŭ kelkaj HALEanoj instruis al grupoj de laboristoj Esperanton; sed krom ĉion antaŭmenciitan oni faris nenion. Mi kredas, ke ***Kajeroj el la Sudo*** sufiĉe pliboniĝis, kaj atingis altan kvaliton lastatempe; eĉ pli, preskaŭ ideala povas ŝajni nia asocia situacio, aŭskultinte la opinion de iuj samideanoj, tio estas: “HALE neniam estos multnombra aŭ ege influa asocio ĉar ĝi estas samtempe esperantista (en socio kie Esperanto estas margena fenomeno), landa, kaj faka (laborisma); do, kelkaj dekoj da anoj kaj bonkvalita presita organo estas sufiĉaj”. Ĉu nia situacio estas ja ideala kaj sekve neplibonigebla? Kvankam sukcesoj kontentigaj certe estas, ni ne montriĝu tro optimismaj. Sekve,

mi esprimos kelkajn agadliniojn por plialproksimiĝi al niaj celoj progresaj kaj klerigaj, kaj garantii sufiĉan membraron.

Kaptado de rimedoj.— La nura kolekto de kotizoj de la HALEanoj krom de la simplaj legantoj de nia revuo permesis ĝis nun financi, ne tro malavare, la eldonon de ***Kajeroj el la Sudo*** kaj alfronti la interretajn pagojn. Ni kaptu tial pli abundajn rimedojn, kaj, tiucele mi sugestas la jenajn iniciatojn:

- *Serĉi privatajn firmaojn interesataj anonci siajn varojn pere de la paĝoj de **Kajeroj el la Sudo*** —ion similan faris AEU (Andaluza Esperanto Unuiĝo) por sia bulteno.
- Konsulti plurajn neregistarajn organizaĵojn progresemajn (Unuiĝintaj Manoj, Intermon’ Oxfam, Ruĝa Kruco, Amnestio Internacia, ktp.) pri la ebleco *oferti ilin luadon de nia reta spaco kiel pagatan kunlaboron por ties kampanjoj solidaraj kun la politikaj persekutitoj, la malriĉuloj de la neevoluintaj landoj, kaj la rifuĝintoj.*
- Sekvi ankaŭ en HALE la kutimon de aliaj Esperanto-asocioj disvendi partoprenbiletojn por la Hispana Nacia Loterio.
- *Registri nian asocion en la koncerna Hispana Ministerio kiel asocion solidaran, kio kunportus impostoajn rabatojn por tiuj personoj, kiuj volonte donacus al ni monon por la kampanjoj de HALE;* tiel, ke ni povu disponi de fonduso por progresemaĵ kampanjoj. Nature, la HALEanoj devus unue fari liston de eblaj solidaraj kam-

panjoj, ekzemple: helpo al sendomuloj kaj enmigrintoj pere de la sekcioj de kelkaj sindikatoj, pere de aliaj helpaj asocioj, au per ni mem.

Redifino de la agadkampo de nia asocio.- Jam klarigitaj la trajtoj kaj celoj de HALE, restas klarigi ĝiajn kampojn de agado. Ili estas:

1 Per kajera aŭ interreta.

Mia propono havas la jenajn flankojn:

- Pli bonigo de la kvalito de la revuo per uzo de la naturaj koloroj; kaj pri bildoj kaj pri la tekstoj; kondiĉe, ke la rezultaj eldonelspezoj ne estu troaj por la financa situacio de HALE.
- Stimuli la legadon de la **Kajeroj el la Sudo** kiel eble plej vaste, ene de la esperanta mondo per pagitaj anoncetoj sur la pagoj de Boletín kaj aliaj esperantaj periodaĵoj.
- Dediĉi virtualan spacon por la konsultoj au plendoj de la membraro de HALE, au aliaj esperantistoj, al la estraro de la asocio; ciam, nature, kiam la menciitaj komunikoj ne estas strikte privataj. La respondoj aperus ĉu en tiu spaco, ĉu sur la pagoj de la revuo.
- Negoci kun neregistaraj solidaraj organizaĵoj kies celoj ne kontraŭas tiujn niajn, la utiligon de niaj virtuala spaco kaj revuo por la diskonigo de ties kampanjoj (en Esperanto) krom la publikigon de pagitaj anoncetoj fare de ili.
- Stimuli la legadon de la presitaj **Kajeroj el la Sudo** inter la geesperantistoj de la neevoluintaj landoj. Tiucele oni povas malpli altigi la abonojn por la tiel landanoj au oferti kelkajn senpagajn abonojn al la tiulandaj verkintoj de suface interesaj artikoloj au eseoj, pri kulturaj au sociekonomiaj temoj koncernantaj siajn proprajn mediojn, aŭ la mondon.
- Oferti al la hispanaj geesperantistoj sendungaj rabatitajn abonojn por HALE,

pruvinte ties kondicon, dum limigite tempo; la abono estus tute senpaga, se ili instruus Esperanton nome de HALE, au perus je nia nomo, antaŭ sindikatoj au politikaj partioj, favore al progresemaĵoj iniciatoj.

2 Eksterkajera per rektaj personaj kontaktoj.

Unue mi emfaze rimarkigas, ke la estraro devas kalkuli kun la persona kompromito de grupo de HALEanoj, ne nur kun la konfido de la majoritato. Nu, necesas, ke post la malfermo de ĉi virtuala aranĝo oni alvoku duan parton, tiufoje ne virtuala, por ke balotinte la konkludojn la tuta membraro de la asocio (la interretanoj kaj la neposedantoj de ĝi), oni povu organizi laborgrupojn kaj laborskizojn. Jene mi sugestas kelkajn agadliniojn:

- Kontraŭstari la fifamigan kampanjon kontraŭ HALE montrante publike nian plendon per, ekzemple: aktiva partopreno en la venonta kongreso de SAT, defendante la politikan linion de nia asocio, krom per plendaj leteroj al la Plenumkomitato de SAT.
- *Esplori la ŝancojn de plibonigo de la politika situacio de Esperanto, ĉu en Hispanio, ĉu en Eŭropa Unuiĝo, kune kun aliaj esperantistoj (de HEF, SATeH, UEA, SAT-institucioj) por poste starigi regulajn kontaktojn kun la koncernaj politikaj fortoj.*

Kontakti kun SAT por ke ili sciigu al ni je kiuj solidaraj kampanjoj nia LEA povas helpi ilin, kaj kian kunlaboron ili deziras.

Partopreni en festoj de partioj au sindikatoj, same kiel en manifestacioj progresemaĵoj por diskonigi Esperanton en laboristaj medioj, helpi je la plijustigo de la mondo kaj meti en praktikon la sennaciismon.

Samideane via,

José Pina Tuells.

Kio estas Progreso?

Kio estas esti progresisto?

Kian funkcion havas informado por progresisto?

Per la apero de ideologioj laboristaj dum la 19-a jarcento, kaj socialismo kaj anarĥiismo trovis, ke unu el la roloj, kiujn intelektuloj alportas sian tutan inteligenton, argumentojn kaj eblecojn je la servo de la kaŭzo, sengrave al tio, ĉu ĝi estas vera aŭ mensoga.

Orŭel bildigas tiun intelektulon kiel servanton de propagando, kaj mi konsentas kun Orŭel pri tio, ke tia intelektulo, kiu faras tiun rolon, perdas sian kapablon pri kritiko kaj, eble, sian rolon kiel intelektulon.

Estis komunistoj tiuj, kiuj plej bone komprenis la rolon de propagando kaj tiusekve de kino: Hitlero estis la unua politikisto, kiu uzis aviadilon por siaj movoj, kaj li metis je la servo de la ŝtato ĉiujn mediojn komunikilajn (Goebbels diris, ke grandaj mensogoj, multfoje ripetitaj, iĝas grandajn verojn). Pri la utiligo de radio, ni devas memori pri la arengoj kaj prelegoj diritaj de Generalo Kejpo de Ljano dum la Hispana Intercivitana Milito.

Alvenite al ĉi tiu punkto, ni demandu: ĉu progresisto estas propagandisto?

Persone, mi kredas, ke ne, ĉar se jes, ni devus konsenti, ke faŝisto estus tiom progresista, kiom anarĥiisto, socialisto, kiom bigoto, komunisto kiel aŭtovendisto.

La diferenco inter ideologioj politikaj kaj progresismo kuŝas je la rifuzo de propagando kaj akcepto, de progresistoj, de analizo, kritiko kaj serĉado pri vero.

Ĉe HALE oni praktikas progresismon, ĉar estante asocio kultura por laboristoj, ni publikigas artikolojn, kie la rolo de propagandistoj estas malmitigita, kaj oni kritikas la ekonomian sistemon nunan.

La ideologioj tradiciaj de maldekstro jam bankrotas pro manko da kritika kapablo. Ili malantaŭeniras, rezistante tiom bone, kiom ili povas, la atakojn de grupoj ekonomiaj; kaj tio tradukiĝas en plialtiĝon de laborhoroj, plialtiĝon de la retiraĝo, kaj eĉ, en Francio, eliminon de festotagoj por igi ilin labortagoj.



George Orŭel

Tio pruvas la bankroton de la maniero interpreti la realon, kiu venas de la 19-a jarcento, kaj la serĉadon de nova maniero interpreti la realon: nur progresismo povas krei novan pensmanieron, kiu permesu al ni alfronti la novajn defiojn socialajn kaj atakojn de la ekonomiaj sektoroj.

Nek maldekstraj partioj, nek sindikatoj, de siaj antaŭsupozitaj ideologiaj, utilas, ĉar ili jam iĝis balotaj maŝinoj. Sufiĉu ekzemplo je la lastaj balotoj je la Aŭtonoma Komunumo de Madrido: la kandidato socialisma Rafaelo Simankas promesis senpagan bileton por la metroo de Madrido por junuloj kaj emerituloj. Sendube la balota maŝinaro de PSOE detektis tri grandajn sektorojn de voĉdono: junuloj, emerituloj, kaj virinoj..., sed ili forgesis laboristojn, kiuj estas tiuj, kiuj iras al siaj metiejoj ĉiun tagon kaj ili estas tiuj, kiuj uzas la metroon. Alidirite, ili praktikis balotan politikon, forgesante tiujn, kiujn ili reprezentas. La rezulto estis nova fiasko balota por PSOE.

De sociala vidpunkto progresismo estas la defendo de ŝtato de bonfarto antaŭ la atakoj de grupoj ekonomiaj, kiuj, sub la flago de defendo de merkato, deziras la malaperon de tiu ŝtato.

Defendante la Ŝtaton de Bonfarto, progresismo konsentas kun maldekstraj partioj, kaj pro tio oni kutimas konfuzi ilin, ambaŭ konceptojn, sed nuntempe nek la partioj maldekstraj nek sindikatoj laboristaj povis haltigi la kosntantan malboniĝon de la Ŝtato de Bonfarto.

La produktiveco de nia ekonomio estas multe pli alta ol nia produktiveco je la jaroj sesdekaj, kaj nun pli da produktiveco signifas, en sociala aspekto, pli granda atako al Ŝtato de Bonfarto.

Je tiu atako partoprenas la amaskomunikiloj per sia kritiko de franca iniciato por starigi laboristan semajnon de 35 horoj, klarigante, ke la franca ekonomia recesio estas produkto de tiu plialtigo.

Sekvante tiun logikon, la ekspansio ekonomia eŭropa de la jaroj sesdekaj ne estintus ebla ĉar tiam la laboristan semajnon oni plialtigis.

Tiu ĉi manipulado prenas nin en radikalan formuladon, kiu estas la defendo de libereco pri penso, ĉar funda elemento de progresismo estas forlasi la koncepton propagando. Sperto lernigas nin, ke socioj, kiuj estas submetitaj al propagando de partio finiĝas la partion. Bona ekzemplo estas la disfalo de komunismo, kiu submetinte siajn sociojn al intensa propagando, ili malaperis kiel formo de Ŝtato, ĉar ili ne eblis evolui pro la absoluta graveco de konceptoj ideologiaj, kiuj kontraŭis liberecon pri penso.

El HALE oni defendas la liberecon da penso, ĉar ĝi estas la sola ŝlosilo, kiu povas fari nin liberajn homojn, kiujn neniu povas manipulasi. Antaŭ amaskomunikiloj, kiuj deziras nur, ke civitanoj laboru pli, en HALE ni havas defendon pri libereco de penso, kiu permesas nin kritiki la opciojn de partioj dekstraj, mezaj kaj maldekstraj, sindikatojn, ĉar ili iĝis balotaj maŝinaroj kaj sekcioj ministeriaj. Por ni nenio estas sankta aŭ netuŝebla, ĉefe se temas pri politikaj balotaj opcioj.

De ekonomia vidpunkto, la alporto ĉefa de progresismo estas la partoprenado ekonomia de civitanoj en organizojn entreprenajn. Kaj je tiu punkto ĝi apartiĝas de tradicia maldekstro, ĉar havinte la povon, ili apartigas la civitanojn el partopreno ekonomia.

Kiel oni povas partopreni en ekonomio? De la mikroekonomio, kontrolante la akciojn de entreprenoj. La entreprenoj havas malfortan punkton, kiu estas akcioj: tiu, kiu kontrolas akciojn, kontrolas la entreprenon. Sekve, de la tradicia maldekstro oni rifuzas ĉian ideon partopreni en demarŝo de

entrepreno ĉar ili ja estas simbolo kaj aktiva elemento de kapitalo, ĝi ja estas la malamiko.

Progresismo ne kunhavas tiun ĉi vidpunkton, ĉar kontrolo de mikroekonomio irigas al kontrolo de la kondiĉoj de laboristoj kaj de socio. Sufiĉu la sekvanta ekzemplo: nun entreprenoj kontrolas stabanuloj, kiuj postulas siajn kondiĉojn al akcipozedantoj per promesoj pro produktiveco kaj dividendoj; kaj tiel oni justigas fermigon de faktorioj, maldungigon, ekspluatadon de infanoj. Sed male, nek maldekstraj partioj nek amaskomunikoloj diras, ke tiuj ĉi samaj stabanuloj subskribas kontraktojn blenditajn kun siaj entreprenoj, nek tio, kiom da tiuj stabanuloj ruinigis siajn entreprenojn, kaj ankaŭ ne parolis pri tio la akciuloj, kiuj, soifante pri dividendoj, ne zorgis pri infana laborado aŭ fermigo de faktorioj.

Oni devus publikigi liston da stabanuloj kun blenditaj kontraktoj, kaj kiom da laborpostenoj devas perdiĝi, kaj kiom da eksterordinaraj horoj laboristoj devas fari por pagi ilin.

Partioj maldekstraj kun povo, aŭ sindikatoj, kiuj havas povon, neniam informas pri blenditaj kontraktoj de stabanuloj, ĉar ne gravas al ili. En Usono laboristoj rezignas pri parto de siaj ferioj (kiu entutas nur tri semajnoj) por produkti pli. Por progresistoj ja evidentas la rilato inter salajroj de stabanoj kaj perdo da bonfarto de laboristoj, sed tiu evidento ne estas rimarkata de memnomitaj porgresistaj partioj.

Hodiaŭ progresismo ne nur estas defendo pri libereco da penso aŭ ekonomia partoprenado de civitanoj, sed ĝi estas malferma al defendo de la medio.

La germana Verda Partio ebligis bonfarton per sia defendo de la medio, ĉar ĝi organiziĝis politike kiel forto. Eble la novaj manieroj interpreti la realon kaj transformi ĝin en bonfarton estos ekologiismo.

La venontan kongreson virtualan de HALE ni povos paroli pri tio.

Por voĉdonado:

Ĉu oni aprobu, ke HALE iĝu asocio progresista, kies celoj estu defendo de libereco pri penso, partoprenado de civitanoj en ekonomio kaj defendo de la medio?

Juan Antonio Cabezas Martínez

La Faraono

ĈAPITRO XI

La monato Tot finiĝis kaj komenciĝis la monato Paofi (dua parto de julio). La akvo de Nilo, antaŭe verda, fariĝis blanka, poste ruĝa kaj senĉese kreskis. La reĝa akvomontrolo en Memfiso estis plenigita preskaŭ ĝis la alteco de du homoj, kaj Nilo kreskis ĉiutage je du manlarĝoj. La plej malaltaj kampoj estis



superverŝitaj, de la pli altaj oni rapide kolektis linon, vinberojn kaj specon de kotono. Sur la lokoj, kiuj matene estis ankoraŭ sekaj, vespere plaŭdis la ondoj.

Ŝajnis, ke fortega kvankam nevidebla vento blovas de la fundo de l' rivero. Ĝi plugas sur ĝi grandajn sulkojn kaj plenigas per ŝaŭmo, poste glatigas la supraĵon de la akvo, kaj post momento tordas ĝin en senfundajn akvoturnojn.

Ree ĝi plugas, ree glatigas, tordas, alpelas novajn akvajn montojn, novajn ŝaŭmajn striojn

kaj senĉese levas la murmurantan riveron, senĉese akiras novajn terajn pecojn. Ifoje la akvo, atinginte ian limon, transsaltas ĝin en la daŭro de unu ekrigardo, verŝiĝas sur la malaltaĵon kaj formas brilantan lageton tie, kie antaŭ unu momento la velkintaj herboj falis teren cindrigitaj.

Kvankam la leviĝo atingis apenaŭ la trionon de la ordinara alteco, jam la tuta bordo estis subakvigita. Ĉiuhore iu bieno sur monteto fariĝis simila al insulo, en la komenco, apartigita de la aliaj nur per mallarĝa kanalo, kiu iom post iom plilarĝiĝis kaj pli kaj pli apartigis de la najbaraj domoj la novan insulon. Ofte iu, kiu eliris al la laboro piede, revenis en ŝipeto.

Pli kaj pli multe da ŝipetoj kaj flosoj aperis sur Nilo. De unuj oni fiŝkaptis per retoj, en aliaj oni transportis la rikoltojn en la grenejojn aŭ la blekantajn brutojn en la stalojn, en aliaj oni akceptis vizitojn, por anonci al ili la leviĝon de Nilo (kiun vidis ĉiuj), inter ridoj kaj krioj. Ifoje ŝipetoj, kuniĝintaj kiel aro da

anseroj, diskuradis en ĉiujn direktojn por tralasi grandegan floson, kiu portis el Supra Egipto malsupren grandegajn ŝtonojn, elhakitajn en la apudbordaj minejoj.

En la aero ĉie, kie povis aŭdi la orelo, sonis la kreskanta akvo, krio de la timigitaj birdoj kaj gajaj kantoj de l' homoj: Nilo leviĝas, ni havos multe da greno.

Dum ĉi tiu tuta monato oni faris juĝan esploron en la afero de la atako kontraŭ la domo de l' kronprinco. Ĉiumatene ŝipo kun oficistoj kaj soldatoj albordiĝis al iu bieno. Oni forŝiris

homojn de ilia laboro, superŝutis ilin per insidaj demandoj, batis per bastonoj. Ĉiuvespere du ŝipoj revenis Memfison: unu portis la oficistojn, la alia la arestitojn.

Tiamaniere oni kaptis kelkcenton da krimuloj, el kiuj granda parto sciis pri nenio. La duonon minacis la malliberejo aŭ kelkjara laboro en la ŝtonminejoj. Sed oni eksciis nenion: nek pri la kondukintoj de l' atako, nek pri la pastro, kiu admonis la popolamason disiri.

En la princo Ramzes kuniĝis ekstreme kontraŭaj ecoj. Li estis vivega kiel leono kaj obstina kiel bovo. Sed krom tio li posedis grandan saĝon kaj profundan senton de l' justeco.

Vidante, ke la juĝa esploro restas sen rezultato, la princo mem ŝipveturis Memfison kaj ordonis malfermi al si la malliberejon.

Ĝi estis konstruita sur monteto, estis ĉirkaŭita de alta muro kaj konsistis el granda nombro de konstruaĵoj ŝtonaj, brikaj kaj lignaj. Ĉi tiuj konstruaĵoj estis plejparte nur vestibloj aŭ loĝejoj de l' gardistoj. La malliberuloj estis fermitaj en subteraj kavernoj, elhakitaj en kalka ŝtonego.

Kiam la kronprinco transpasis la pordon, li rimarkis areton da virinoj, kiuj lavis kaj nutris malliberulon. Ĉi tiu homo, nuda kaj simila skeleton, sidis sur la tero, kun la manoj kaj piedoj en kvar truoj de kvadrata tabulo, anstataŭanta katenojn.

—Ĉu de longe ĉi tiu homo tiel suferas? — demandis la kronprinco.

—Du monatojn —respondis la gardisto.

—Ĉu longe ankoraŭ li devas resti ĉi tie?

—Unu monaton.

—Kion li faris?

—Li insultis oficiston, kolektantan la impostojn.

La prineo sin turnis kaj ekvidis alian areton, konsistantan el virinoj kaj infanoj. Inter ili estis maljuna homo.



—Ĉu ili estas malliberuloj?

—Ne, via ekscelenco. Tio estas familio, atendanta la kadavron de krimulo, kiu estas sufokota... Jen oni kondukas lin en la ĉambron... — diris la gardisto.

Poste turnante sin al la areto, li diris:

—Estu paciencaj ankoraŭ unu momenton, karaj homoj, vi tuj ricevos la korpon.

—Ni tre dankas vin, nobla sinjoro, — respondis la maljunulo, kredeble la patro de la krimulo. — Ni eliris el nia domo hieraŭ vespere, la lino restis sur la kampo, kaj jen Nilo leviĝas!...

La princo paliĝis kaj haltis.

—Vi scias — li turnis sin al la gardisto, — ke mi havas la rajton de pardono?

—Jes, erpatre — respondis la gardisto sin klinante, kaj poste li aldonis: —Laŭ la leĝoj, kiel rememoro de via vizito en ĉi tiu loko, de l' puno la krimuloj bone kondukantaj, kiuj estis kondamnitaj pro ofendo de la religio aŭ ŝtato. La listo de ili estos metita ĉe viaj piedoj dum ĉi tiu monato.

—Kaj tiu, kiu atendas nun la sufokon, ĉu li ne havas la rajton ricevi mian pardonon?

La gardisto disetendis la manojn kaj kliniĝis silente.

Ili ekiris antaŭen kaj trapasis kelke da kortoj. En lignaj kaĝoj, sur nuda tero, svarmis sur

malvasta spaco la kondamnitaj. En unu konstruaĵo sonis teruraj krioj: oni batis, por ricevi konfeson.

—Mi volas vidi la kulpigitajn pri la atako kontraŭ mia domo— diris la kronprinco profunde impresita.

—Ili estas pli ol cent— respondis la gardisto.

—Elektu la plej kulpajn laŭ via opinio kaj esploru ilin en mia ĉeesto. Sed mi ne volas, ke ili rekonu min.

Oni malfermis al la kronprinco la ĉambron, en kiu estis okupita la esplora oficisto. La princo ordonis al li resti sur lia seĝo kaj li mem sidiĝis post kolono.

Baldaŭ komencis aperi, unuope, la kulpigitaj. Ĉiuj estis malgrasaj; iliaj haroj kaj barboj kreskis longaj, iliaj okuloj havis esprimon de trankvila frenezo.

—Dutmoze— diris la oficisto —rakontu, kiel vi atakis la domon de lia ekscelenco, erpatre?

—Mi diros la veron, kiel ĉe la juĝo de Oziriso. Tio estis vespere en la tago, kiam Nilo estis leviĝonta. Mia edzino diras al mi: «Venu, patro, ni suriros la monton, de kiu oni povas pli frue vidi la signalon en Memfiso.» Ni do suriris la monton, de kiu oni povas pli facile vidi la signalon en Memfiso. Tiam al mia edzino proksimiĝis soldato kaj diras: «Iru kun mi en ĉi tiun ĝardenon, ni trovos tie vinberojn aŭ eble ion ankoraŭ pli bonan.» Mia edzino eniris en la ĝardenon kun la soldato, kaj mi terure ekkoleris kaj rigardis al ili trans la muro. Ĉu ili ĵetis ŝtonojn en la domon de l' kronprinco? mi ne povas tion diri, ĉar pro la arboj kaj mallumo mi povis vidi nenion.

—Kaj kiel vi povis lasi la edzinon kun la soldato?— demandis la oficisto.

—Kun la permeso de via ekscelenco, kion mi povis fari? Mi estas nur kamparano, kaj li batalisto kaj soldato de lia sankteco...

—Kaj ĉu vi vidis la pastron, kiu parolis al vi?

—Tio ne estis pastro— respondis la kamparano per firma tono. —Tio devis esti la dio Num mem, ĉar li eliris el la trunko de figarbo kaj havis ŝafan kapon.

—Kaj ĉu vi vidis, ke li havis ŝafan kapon?

—Kun via permeso, mi ne memoras bone, ĉu mi mem vidis aŭ ĉu aliaj tiel diris: Miajn okulojn kovris la maltrankvilo pri la edzino.

—Ĉu vi ĵetis ŝtonojn en la ĝardenon?

—Por kiu mi estus ĵetinta ilin, sinjoro de l' vivo kaj morto. Se mi tiam trafus la edzinon, mi farus al mi maltrankvilon por tuta semajno, se la soldaton, mi ricevus tian pugnofrapon en la ventron, ke la lango elirus. Ĉar mi estas nur kamparano, kaj li soldato de nia sinjoro eterne vivanta.

La kronprinco kliniĝis de post la kolono. Oni forkondukis Dutmoze' on kaj enkondukis Anup' on. Tio estis malalta kamparano, sur la dorso li havis ankoraŭ cikatrojn de la bastonoj.

—Diru Anup— komencis ree la oficisto, —kiel tio okazis en la atako kontraŭ la domo de l' kronprinco?

—Okulo de la suno— respondis la kamparano— vazo de l' saĝeco, vi scias plej bone, ke mi ne faris la atakon... Nur venis al mi najbaro kaj diras: «Anup, ni iru sur la monton, ĉar Nilo leviĝas.» Kaj mi diras: «Ĉu efektive ĝi leviĝas?» Kaj li diras: «Vi estas pli malsaĝa ol la azeno, ĉar la azeno ja aŭdus la muzikon sur la monto, kaj vi ne aŭdas.»

Kaj mi respondas: «Mi estas malsaĝa, ĉar mi ne lernis skribi; sed kun via permeso, alia afero estas la muziko, alia la leviĝo de Nilo.» Kaj li diras: «Se ne estus la leviĝo, oni ne havus kaŭzon por la ĝojo, muziko kaj kantoj.» Ni do iris, mi diras al via justeco, sur la monton, kaj tie oni jam dispelis la muzikistojn kaj ĵetis ŝtonojn en la ĝardenon...

—Kiu ĵetis?

—Mi ne povis distingi. Ili ne havis aspekton de kamparanoj: ĝustadire ili similis malpurajn paraŝitojn, kiuj distranĉas la mortintojn por enbalzamigo.

—Ĉu vi vidis la pastron?

—Kun la permeso de via vigleco, tio ne estis pastro, sed certe ia spirito, kiu gardas la domon de l' kronprinco... li vivu eterne!...

—Kial spirito?

—Ĉar iafoje mi vidis lin, kaj iafoje li ien malaperis.

—Ĉu eble li tiam estis kaŝita en la popolamaso?

—Sendube la popolamaso iafoje kovris lin. Sed krom tio jen li estis pli alta, jen pli malalta.

—Eble li suriris monteton kaj poste mallevigis?

—Sendube, li suriris kaj mallevigis, sed eble li plilongigis kaj malplilongigis, ĉar li estis granda faranto de mirakloj. Apenaŭ li diris: «Tuj levigos Nilo» kaj en la sama momento Nilo komencis kreski.

—Ĉu vi ĵetis ŝtonojn, Anup?

—Kiel mi kuraĝus ĵeti ŝtonojn en la ĝardenon de la kronprinco?... Mi ja estas simpla kamparano, kaj mia mano sekigis ĝis la kubuto pro tia malpiaĵo.

La princo ordonis interrompi la esploradon. Kaj kiam oni elkondukis la kulpigitojn, li sin turnis al la oficisto.

—Do ĉi tiuj homoj apartenas al la plej kulpaj?

—Vi diris, sinjoro —respondis la oficisto.

—En tia okazo oni devas hodiaŭ senprokraste ellasi ilin. Oni ne povas malliberigi homojn pro

tio, ke ili volis konvinkiĝi, ĉu la sankta Nilo levigas, aŭ pro tio, ke ili aŭskultis muzikon.

—Plej alta saĝo parolas per via buŝo, erpatre —diris la oficisto. —Oni ordonis al mi trovi la plej kulpajn, mi do elektis tiujn, kiujn mi trovis. Sed mi ne havas la povon redoni al ili la liberecon.

—Kial?

—Rigardu, via ekscelenco, ĉi tiun keston. Ĝi estas plena de papirusoj, sur kiuj estas skribitaj la aktoj de la afero. La juĝisto de Memfiso ĉiutage ricevas raportojn pri la rezultatoj de la juĝa esploro kaj transdonas ilin al lia sankteco. Kio do fariĝus el la laboro de tiom da instruitaj skribistoj kaj grandaj homoj, se oni liberigus la kulpigitojn?

—Sed ili estas senkulpaj! —ekkriis la princo.

—Estis atako, estis do krimo. Kie ekzistas krimo, devas ekzisti krimuloj, kaj kiu jam falis en la manojn

de la justeco kaj estas enskribita en la aktoj, tiu ne povas foriri sen rezultato. En la drinkejo oni trinkas kaj pagas; en la foiro oni vendas kaj ricevas la monon; sur la kampo oni semas kaj rikoltas; en la tombo oni ricevas la benojn de la mortintaj antaŭuloj. Kiel do iu veninte en la juĝejon, povus foriri sen io ajn, kiel vojaĝanto, kiu haltas en la mezo de sia vojo kaj turnas la paŝojn al sia domo, ne atinginte la celon?

—Vi saĝe parolas —respondis la kronprinco.

—Tamen diru al mi, ĉu lia sankteco mem ne havus la rajton liberigi ĉi tiujn homojn?

La oficisto krucis la manojn kaj klinis la kapon.

—Li, egala al dioj, povas fari ĉion, kion li volas: liberigi la kulpigitojn, eĉ kondamnitajn; li eĉ



Boleslau Prus

povas detruji la aktojn de la afero, kaj tio, farita de ordinara homo, estus granda malpiaĵo.

La princo adiaŭis la juĝiston kaj ordonis al la gardisto doni pli bonan nutraĵon al la kulpigitoj pri la atako; la elspezojn li promesis pagi mem. Poste incitita li forveturis al la alia bordo de la senĉese plilarĝiĝanta rivero kaj iris en la palacon peti la faraonon nuligi la malfeliĉan aferon.

Sed en tiu tago lia sankteco estis okupita per multenombraj religiaj ceremonioj kaj per la kunsido kun la ministroj, la kronprinco do ne povis lin vidi. Tiam la princo sin turnis al la granda skribisto, kiu, post la ministro de la milito, havis plej grandan influon. Ĉi tiu maljuna kortegano, pastro de unu el la temploj de Memfiso, akceptis la princon afable, sed malvarme. Aŭskultinte ĉion, li respondis:

—Mi miras, ke via ekscelenco volas maltrankviligi nian sinjoron per tiaj aferoj. Tio estas, kvazaŭ vi petus lin ne ekstermi la akridojn, kiuj falis sur la kampojn...

—Sed ĉi tiuj homoj estas senkulpaj!

—Ni, via ekscelenco, ne povas tion scii, ĉar pri la kulpo decidis la leĝo kaj la juĝo. Unu afero estas por mi certa, ke la ŝtato ne povas toleri atakojn kontraŭ ies ajn ĝardeno, tiom pli kontraŭ la propraĵo de la kronprinco.

—Vi juste parolas, sed kie estas la kulpaj?... — demandis la princo.

—Kie ne estas kulpaj, devas esti, almenaŭ, punitaj. Ne la kulpo, sed la puno, sekvanta la krimon, instruas la aliajn, ke estas malpermesite tion fari.

—Mi vidas — interrompis la kronprinco — ke via ekscelenco ne subtenos mian peton ĉe lia sankteco.

—Saĝo fluas el via buŝo, erpatre — respondis la altrangulo. — Neniam mi povus doni al mia sinjoro konsilon, kiu malutilus la respekton al la leĝa povo...

La princo revenis hejmen ĉagrenita kaj mirigita. Li sentis, ke oni agas maljuste kontraŭ kelkcento da homoj, kaj vidis, ke li ne povas savi ilin, same kiel li ne povus liberigi homon, sur kiun falis obelisko aŭ kolono de templo.

—Tro malfortaj estas miaj manoj por levi ĉi tiun konstruaĵon — pensis la princo kun doloranta koro.

Unuan fojon li eksentis, ke ekzistas ia senfine pli granda forto ol lia volo: la ŝtata racio, kiun respektas eĉ la ĉiopova faraono, kaj antaŭ kiu devas kliniĝi li, la kronprinco!

Falis la nokto. Ramzes ordonis al la servistoj akcepti nenium kaj sola promenis sur la teraso, meditante.

—Terura afero!... Tie disigis antaŭ mi la nevenkeblaj regimentoj de Nitager, kaj tie ĉi — la gardisto de la malliberejo, la juĝisto kaj la granda skribisto baras al mi la vojon... Kio ili estas?... Mizeraj servistoj de mia patro (li vivu eterne!), kiu en ĉiu momento povas faligi ilin inter la sklavojn kaj sendi ilin en la ŝtonminejojn. Sed kial mia patro ne povus liberigi la senkulpajn? Ĉu la ŝtato ne volas?... Kaj kio estas la ŝtato?... Kion ĝi manĝas, kie ĝi dormas, kie estas liaj manoj kaj lia glavo, kiun

ĉiuj timas?

Li ekrigardis en la ĝardenon kaj inter la arboj, sur la supro de l' monteto ekvidis, la du grandegajn siluetojn de la pilonoj, sur kiuj brulis la torĉoj de la gardistoj. La gardistoj neniam dormas — pensis li, — la pilonoj neniam manĝas, tamen ili estas. Pilonoj, kiuj ekzistas de nememorebla tempo, potencaj kiel la estro, kiu konstruis ilin — Ramzes Granda.

Ekmovi ĉi tiujn konstruaĵojn kaj centojn da similaj; trompi ĉi tiujn gardistojn kaj centojn da aliaj, kiuj defendas la sendanĝerecon de Egipto; malobei la leĝojn, kiujn lasis Ramzes Granda kaj aliaj potenculoj, liaj antaŭuloj ankoraŭ pli grandaj ol li,

Finas je paĝo 24-a

Enkonduko en muzikon

Georgo Brasan'


Filo de masonisto, li translokiĝis en Parizon je 1939, ne tre multe altirigite al prospekto fini sian abiturienton. Sen rimedoj, li estis gastigita de Ĵan Planŝ', kiun li kantos poste per *La cane de Jeanne* (la kano de Johanino) kaj *Chez Jeanne* (ŝe Ĵan', ĉe Johanino), kie li vivas ĝis ŝia morto, je 1968.

Li laboras en metiejo Renault, kaj je 1942 li publikigas poemlibron nomitan *À la venvole*. Post la milito, li verkas kaj aliĝas al la Federacio Anarĥista, kaj li eĉ kolaboracias en la *Liberecana (Libertaire)*. Jakobo Grelo *malkovras* lin je 1952, kaj sekve li translokiĝas en *Trois Baudets* kaj Paera, registras sian unuan diskon por Philips, en kiu li inkluzivas la kantojn *La malbona reputacio* kaj *La gorilo*. Li publikigas dum tiutempo la novelon *La turo de mirakloj* (1953) kaj poemojn sub la nomo *La malbona reputacio* (1954). Post tiam, lia sukceso ne paŭzis ĝis kiam li mortis. Liajn diskojn oni rekopilis senĉese, kaj ofte la kantojn oni tradukas en diversajn lingvojn, inter ili la hispanan, kaj nedubele li kontribuis, verŝajne senvole, lanĉi la modon kanti kun akompona de nur gitaro (*kantaŭtoro*).

La verkaro de *Brassens* konsistas el ĉirkaŭ 150 kantoj, kaj ĉiam estis celo por multe da komentoj kaj tentoj alproprigi de kelkaj kolektivoj, inter ili la plej bizara tiu de Jakvo Ĉarpentro' (Jacques Charpentreau), kiu penis provi, ke tiu aktiva ateisto estas vere nekonscia kristano!

Veras, lia temaro ne estas ĉiam klara, sed tamen anarĥismo plejoflas, kiel oni povas vidi je siaj kantoj *Katastrofo* kaj *La pluralo*; sed ankaŭ oftas bedaŭro al pasinto de la tempo de Franko Vilon' (*La mezepokulo*), amikeco (*Je l' arbaro de mia koro, La kunuloj unue*). Sed elirinte tiujn tri ideojn fortajn, oni ne scias kien la aŭtoro venas, kaj kelkaj el liaj tekstoj estas eĉ tre dubesencaj: *La du onkloj*, ekzemple, havas tian kunlaboron, kia ne malmankas

en la mondo. Sed tio ankaŭ partoprenas lian universon: malamiko de etiketoj, difinoj, li kantas tion, kion li pensas entiu momento, sen tio, ke oni povu trovi koheron de teksto al teksto. Ateisto, li ne sukcesas liberiĝi pri la problemo de morto, kiun li kantas per ironio aŭ per poezio, kiu kaŝas mal-trankvilon propran (*La testamento, La funebro de antaŭe, Petego entombiĝi sub la paĝo de Sète*). Ankaŭ li muzikis aŭtorojn «*diskonigitajn*»: François Villon (*Plendo de damoj de tempoj dirlitaj*), Victor Hugo (*Gastilbelza*), Francis Jammes (*La preĝo*), Ludoviko Aragon' (*Ne estas feliĉa amo*), kaj tiel plu. Ĉiukaze, li enkondukas en siajn kantojn, kaj sekve en la kanton francan, poezion, kiun tiu lasta jam perdis delonge, sed poezio kun klazika tipo, kiu plaĉas al instruistoj pri humanstudoj. Ne mirinde, oni ofertis al li eniri la Akademion Francan, oferton, kiu li ne akceptis pro lia partikulara viv' kaj pensmaniero.



Lia muziko povas ŝajni ĉiam sama, sed oni ne eraru: sub la simplaj akordoj de sia gitaro li kaŝis ĉiun ĝenron: **java** (*Le bistrot*), **blues** (*Je la arbaro de mia koro*), kaj eĉ **rokon** (*La kunuloj unue*). Sa voĉo ne estas ekzakte «bela», sed lia maniero faligi vortojn, tre simila al kantistoj de blues, estas malfacile imitebla. La persono tenis atenton dum longe: per kruda verbo (oni vidu, ekzemple *Rondo de vortaĉoj, La bulteno de sano*) per atmosfero grumbla, li kreis baldaŭ la imagon de urso malbone lekita, des pli cxar li ĉiam rifuzis diskonigi la plej malgranda ero de sia privata vivo (kion li klarigas per *Trumpeto de famo*). Li klarigas ankaŭ, per humoro kaj ironio, pri siaj blagoj kaj pri la rolo, kiun la publiko igas lin ludi (*La pornografo de la fonografo*). Pri tio, dirus semiologiistoj, estas nova signo kaj relative stranga en tiu ĉi medio: stelo, kiu rifuzas ludi stelludon, fama homo, kies privatan vivon oni ne scias, ktp. Li permesas, tamen, malfermi kelkajn erojn pri siaj amikoj (Renato Fallet, Johano Petro Ĉabrol, ktp), kio partoprenas ankaŭ en sia universo kaj mito.

Gravas pli ol lia influo sur juna kanto (Petro Pret kaj multaj aliaj), pli ol la omaĝoj al li (Premio de poezio de la Franca Akademio, 1967, *Al Brassens*, kanto de Johano Ferrat) estas la imago de homo simpla kaj sincero, kiu imponas kaj ĉeestos sendube

Kajeroj

el la Sudo



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

REDAKCIO: Poŝtkesto 4461, Tfn° (00 34) 658
E30080 MURCIA, 166 323
HISPANIO

Retskribu al
jesuo@ono.com

<http://www.iespana.es/kajeroj.htm>

<http://www.gazetoteko.com/kajeroj>

Venas el paŝo 22-a

—la leĝojn, kiujn dudek dinastioj sanktigis per sia respekto...

En la animo de l' princo, la unuan fojon en lia vivo, aperis malklara, sed potenca koncepto pri la ŝtato. La ŝtato estas io pli potenca ol la templo en Teboj, pli granda ol la piramido de Ĥeops, pli antikva ol la piedestalo de Sfinkso, pli fortika ol la granito. En ĉi tiu grandega, kvankam nevidebla konstruaĵo, la homoj estas kiel formikoj en fendo de ŝtonego, kaj la faraono kiel arĥitekto vojaĝanto, kiu apenaŭ sukcesas meti unu ŝtonon en la muro kaj jam devas foriri. Kaj la muroj kreskas de generacio al generacio kaj la konstruado daŭras.

Ankoraŭ neniam, li, la filo de l' reĝo, sentis tiel sian malgrandecon, kiel en ĉi tiu momento, kiam lia rigardo vagis tra la nokto super Nilo, inter la pilonoj de la faraona kastelo kaj inter la neklaraj, sed potencaj siluetoj de la temploj de Memfiso.

Subite, inter la arboj, kies branĉoj tuŝis la terason, eksonis voĉo:

—Mi konas vian ĉagrenon kaj mi benas vin. La juĝo ne liberigos la kulpigitajn kamparanojn. Sed ilia afero povas esti nuligita kaj ili revenos en paco hejmen, se la intendanto de via bieno ne subtenos la plendon pri la atako.

—Do mia intendanto plendis antaŭ la juĝo?... —demandis la mirigita princo.

—Vi diris la veron. Li prezentis ĝin en via nomo. Sed se li ne venos en la tribunalon, estos neniu plendanto; kaj kie ne estas plendanto, ne estas krimo.

La arbetoj ekmurmuretis.

—Halto! —kriis Ramzes —kiu vi estas?

Neniu respondis, nur ŝajnis al la princo, ke en la strio de la lumo de l' torĉo, brulanta en la unua etaĝo, pasis kiel fulmo nuda kapo kaj pantera felo.

—Pastro?... —murmuretis la kronprinco. —Kial li sin kaŝas?...

Sed en la sama momento li ekpensis, ke ĉi tiu pastro povus kare pagi por la konsiloj, barantaj la plenumon de l' justeco.

Depósito legal: Z-2398-88. Presejo: Ankatom'.